# EKO 2021
## Esperigaj Komunikoj

Je via servo tra ok jaroj, depost 2013
2020: rekorda jaro: kun 60 komunikoj
Subtene al la loka, landa, faka kaj regiona agado

EKO 2021-53 sendita el Budapeŝto la 4an de decembro


*Al: Komitato, sekcioj kaj aktivuloj de ILEI, Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne). Plie al la Komitato, Konsilianoj, regionaj komisionoj de UEA, TEJO-estraro, gazetaro, partoprenintoj en iuj AMO-seminarioj, aliaj listoj kaj unuopuloj. Pli ol 1500 ricevantoj. Kun plusendoj pli ol 2000.*

Por tuja uzo kaj plia diskonigo inkluzive de la alkroĉaĵoj kun indiko de fonto: EKO de ILEI kaj UEA

## AMO 79 en iu momento havis 79 partoprenantojn!

S-ro Ĉielismo Wang Tianyi (prezidanto de IKEF) prelegis pri la temo 'Esperanto-komerco nature postulas etikon'; s-ro Chimedtseren Enkhee (vic-ĝenerala sekretario de IKEF) prezentis la aktualajn agadojn de IKEF kaj bazaj komprenoj pri komerca etiko; kaj s-ro Ludoviko Zhao Chenghua (vic-prezidanto de IKEF) prezentis informojn kaj bildojn pri instruado de IKEF-Ĉinio, kaj plie okazis 'Saluto de IKEF-Vjetnamio' liverita de s-ino Huang Min.

Komence de la tri-hora seminario enkonduke prelegis s-ro Stefan MacGill (respon-deculo pri AMO-Seminarioj de UEA) pri la seminaria temo 'Etikaj aspektoj de la komerca agado'. La lumbildoj estas alkroĉitaj al ĉi tiu komuniko.  La partoprenontoj eblas esprimi siajn opiniojn, komentojn, spertojn ktp, dum kaj post la seminario, ĉar post fermo de la seminario IKEF okazigis liberan diskuton je la temo.



La seminario estis virtuala, kaj havis en iu momento 79 partoprenantojn. La granda plimulto el Azio, kaj specife Ĉinio. Kvankam ne tiom internacia, mi rimarkis partoprenantojn el Brazilo, Bulgario, Germanio, Hungario, Irano, Japanio, Kongo DR, Kroatio, Mongolio, Rusio, Slovakio, Sud-Afriko kaj Vjetnamio. Ne ĉiu indikas sian landon!  Sur la bildo, la unuaj kvardek partoprenintoj.  IKEF esprimis fortan deziron denove en 2022 organizi AMO-seminarion.

smg

# Nova estraro en Hungario

La landa asocio de UEA en Hungario okazigis elektojn, kiuj liveris novan estraron, kiu elane ekagas sur pluraj kampoj. Jam aperis tri numeroj de nova reta bulteno sub la redaktado de Anjo Amika. Aperis intervjuo kun la nova prezidanto kaj ekonomia vicprezidanto en loka budapeŝta televida stacio.

**Prezidanto:** István Szabolcs, Budapeŝto, <szabolcs.istvan<ĉe>gmail.com>
**Ĝenerala vicprezidanto:** Mónika Forgács <forgacs.monika<ĉe>freemail.hu>
**Ekonomia vicprezidanto:** János Nagy per la asocia adreso: <hungario<ĉe>gmail.com>
**Estrarano:** Gyöngyi Mézes (Perlo Miela), Erd (20 km de Budapeŝto).
<esperla<ĉe>freemail.hu>
**Estrarano:** Miklós Simon, Csolnok (40 km de Budapest).

Pliaj informoj pri Csolnok: https://eo.wikipedia.org/wiki/Csolnok.
Pliaj informoj pri Erd: https://eo.wikipedia.org/wiki/%C3%89rd

Jen ligilo al la paĝo en la Esperanta parto pri la nova estraro:
https://esperantohea.hu/nova-estraro-hea/

Post kelkaj tagoj okazos membro-kunveno kaj la tradicia Zamenhofa festo, ambaŭ en la Asocia sidejo. Tie oni havos eblon renkonti unuafoje la estraranojn, kiujn oni ne jam konas.

# Retaj kursoj en Hungario

Reage al petoj de la Eŭropa Komisiono pri raportado pri retaj kursoj: En Hungario ekzistas eĉ du specoj de tutlandaj interretaj kursoj, kun instruista gvidado kaj klopodo "movadigi" la kursanojn.

- La unua speco de tia kurso funkcias jam de 10+ jaroj. Ĝi ebligas individuan lernedon laŭ la **interaktiva reta versio** de konata E-lernolibro de mi, kun skribaj hejmtaskoj, korektataj de viva instruisto, kiu tenas kontakton kun la lernanto. La kursanon helpas ankaŭ la parola ekzercado, realigata ĉiumonate unufoje per *Zoom*. La kurso estas paga, ĝi daŭras averaĝe 5-6 monatojn, preparas la kursanojn al la meznivela KER-ekzameno en nivelo B2. En la kursomaterialo ĉiu leciono enhavas ankaŭ nacilingvan rakonton pri la Esperanta movado kaj Esperantaj servoj (kun adresoj, retejoj ktp), kaj instigas la kursanon partopreni en ili. *Vidu: www.eszperanto-online.hu*
- La dua speco estas nova fenomeno, jam 2-jara, elformiĝinta kiel sekvo de la virusa situacio. Temas pri **tradicia E-kurso - realigata per *Zoom***, kiun partoprenas retaj kursanoj el ĉiuj anguloj de la lando. La kursomaterialo estas la sama kiel ĉe la individua lernado, do ĝi preparas al la KER-ekzamenoj B2, kaj same inkluzivas movadajn konojn. *Vidu: www.eszperanto-tanfolyam.hu*

Ambaŭ specoj estas vizitataj de junuloj kaj mezaĝaj homoj, en tiu ĉi jaro sume ĉ. 130 personoj, inter ili pli ol 30 personoj havas malpli ol 26 jarojn. Dum la kurso multaj kursanoj estas entuziasmaj pri Esperanto kaj la movadaj ebloj, kaj signifa parto de ili planas "poste" partopreni tiujn post la ekzameno. Tamen en **1-2-3 monatoj post la ekzameno** ili ne trovas lokan aŭ proksiman Esperantan renkontiĝon, kunveneblon

(aŭ se jes, ilia kvalito ne kontentigas ilian pretendon) - kaj la dumkursa entuziasmo same rapide velkas.

En Hungario do mankas ne la kursoj, ne la novaj homoj - sed flegado de la kontaktoj kun la kursfinintoj, mankas la lokaj personaj kunvenebloj, **mankas la ebloj persone konatiĝi kaj renkontiĝi**. La ĉefa motivo de la postkursa aktivado de la novaj homoj estas la loka socia vivo. Novbakitaj homoj sen personaj konatoj, sen parola rutino, sen praktikaj spertoj, solaj ne ekveturas al internaciaj aranĝoj.

Szilvási László

## La radio en Svislando donas al ni voĉon

Estas bezonataj 12000 ĝis 15000 horoj por lerni la anglan lingvon kaj praktiki ĝin en bona nivelo. Neniu ŝtato sukcesas konstrui tian studon en sia instruprogramo. » Jen aserto de François Grin, la 10an de novembro 2021 ĉe la Svisa Romanda Radio en la elsendo « Forum » (en la franca).

Mireille Grosjean

## Dostojevskij – elŝutevskij

Okaze de la ducenta naskiĝdatreveno de Fjodor Dostojevskij la eldonejo "Sezonoj" (Kaliningrado, Ruslando) je la jubilea tago (la 11an de novembro) publikigis "Kvin rakontojn" de Dostojevskij en tradukoj de Grigorij Arosev kaj Aleksander Korĵenkov. La nova bitlibro estas senpage elŝutebla (laŭ la normoj "pdf" kaj "ePub") en la virtuala biblioteko de Sezonoj. Legu pli en la novaĵretejo "La Ondo de Esperanto" https://sezonoj.ru/2021/11/dostojevskij-2/

## Edukado.net nin konstante subtenas

La redaktoro de edukado.net informas vin ke aldoniĝis nova ero ĉe la Kursejo.

Nomo: Jiangsu-a Teknologia Universitato
Gvidantonomo: S-ro Longarko ZHANG Changsheng
Tipo: Nova lerneja kurso
Lando: Ĉinio, Changzhou

## Rezultoj de la 5-a Tradukkonkurso "Lucija Borčić"

**PROZO 1-A PREMIO:**

NICOLINO ROSSI (Italio) por la traduko de la rakonto „La urboj nevideblaj" de Italo Calvino - origina lingvo: itala

**PROZO 2-A PREMIO:**

- STELA BESENYI-MERGER (Hungario) por la traduko de la rakonto „Babiladoj sur plastaj ĝardenaj seĝoj matene" de László Kollár-Klemencz - origina lingvo: hungara
- VITOR LUIZ RIGOTI DOS ANJOS (Brazilo) por la traduko de la rakonto "La eklezio de la diablo" de Maŝado de Asizo - origina lingvo: portugala

**PROZO 3-A PREMIO:**

- MIRELLA DE MARTINI (Italio) por la traduko de la rakonto „Monto" de Mauro Corona - origina lingvo: itala

- ANTONIO RICCO (Italio) por la traduko de la rakonto „Fenestro al la nekonataĵo" de Antonio Tabucci – origina lingvo: itala

### POEZIO 1-A PREMIO

NICOLINO ROSSI (Italio) por la traduko de la poezi-bukedo de tri poemoj: "La foiro”, „Kio estos” kaj „La kozojn ni forgesis” de Nino Pedretti origina lingvo: itala – dialekto romagnolo

### POEZIO 2-A PREMIO:

- MIRELLA DE MARTINI (Italio) por la traduko de la poemo „Ĉiam venu Sinjor'” de David Maria Turoldo – origina lingvo: itala
- BRANDON SOWERS (Usono) por la traduko de la poemo „Paĉjo” de Sylvia Plath – origina lingvo: angla

### POEZIO 3-A PREMIO:

TATJANA AUDERSKAJA (Ukrainio) por la traduko de la poemo “Kamparaj geknaboj” de N. A. Nekrasov - originala lingvo: rusa

## Maria Nazaré Laroca – Galerio de gepoetoj

Belartaj Konkursoj (pere de Esperanto Viva)
https://youtu.be/ZSO_oXFafHk

mga

## Hispanio akceladas la kulturon, ktp.

Liven Dek kantas kune kun Kaj Tiel Plu la originalan esperantan kanton "La kavaliroj". La tekston verkis Abel Montagut kaj Liven Dek, kaj la muzikon komponis Liven Dek.

https://youtu.be/E7EXXzhU1Kk

mga

========= vortoj: 1095 =========

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado. La prezento estas ĝisdata ĝis la **17a aŭgusto 2021** (per EKO 2021-34). Vidu ilin laŭjare, kun klaraj enhavaj indikoj por ĉiu jaro depost 2014.

**ALDONU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj, ktp.

**SUBTRAHU VIN:** Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.

Servo subtenata de Universala Esperanto-Asocio kaj Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj

ilei

Helpantoj:
Rob Moerbeek
Gbeglo Koffi
François
Lo Jacomo

**ENHAVO**

- AMO 79 - multnombra
- Hungario – nova estraro
- Hungario - kursoj
- Tradukkonkursaj rezultoj
- Multaj etaj informoj